

Esperantista

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

„Slepenina.“

Vynikající znalec českého jazyka, spoluautor Slovníku jazyka čes., profesor brněnské university Fr. Trávníček ukazuje v Svobodných novinách z 10. listopadu nepravděpodobnost, zbytečnost i nemožnost vytvoření spisovné slovanštiny jako pomocného jazyka pro Slovany, jak navrhol pan Čech. Nesnadnost úkolu je právě v tom, že každý jazyk je ve svém celku soustavný, organický, strukturní. Nelze však nechat bez poznámky Trávníčkovo tvrzení, že těchto vlastností, to jest strukturnosti a organičnosti, postrádá esperanto, jež je podle něho »mechanická slepenina prvků z nejrozmanitějších jazyků a je proto pro většinu lidí těžší než i nesnadný jazyk přirozený«. Je nám trapno opravovat neporozumění tak primitivní odborníkovi tak proslulému. Esperanto není totiž mechanická slepenina, nýbrž jazyk organický, vyrostlý mezinárodní součinností delší už více než padesát let. Genialita Zamenhofova spočívá asi právě v tom intuitivně předjatém popudu, aby byl pomocný mezinárodní jazyk vytvořen společnou spoluprací mezinárodního bezejmenného a neorganizovaného kolektivu těch, kteří pocítují jeho potřebu a věří v jeho možnost. Popud, jež Zamenhof k tomuto experimentu dal, (zde by se hodilo říci místo popud stimulus v tom smyslu, jak užívají tohoto slova behaviorističtí psychologové) to bylo těch proslulých 16 mluvnických pravidel a 920 slovních kmenů. Metodu, jíž Zamenhof k svým pravidlům a k svým původním kmenům došel, jmenuje nyní interlingvistika naturalistickou. To chce říci, že tyto kmeny a ta pravidla byly odvozeny z nejrozšířenějších evropských jazyků a to podle odhadu jejich frekvence v angličtině, němčině, francouzštině. Tím že byl zaveden akusativ, to znamená, že byl koncovkou označen jediný substantivní pád a to pro přímý předmět, umožnilo tak zvanou slovanskou skladbu: to jest logický pořádek větný. Pokus Zamenhofov se podařil. Umělý mezinárodní jazyk začal se organicky tvořit a dotvořil se asi za dvacet let okolo roku 1910, kdy se ukázalo, že pokus idistů zavést v esperantu reformy dekretem nějaké autority mravní nebo mocenské není prostě možný právě pro životnost esperanta; zcela analogicky, jako není možno nadekretovat reformy přirozenému živému jazyku.

Esperanto prostě je, a je rozšířeno mezinárodně; i když není nikde hnutím mas, není významnějšího městečka na světě, kde by nebylo esperantisty. A není pravděpodobno, že by esperanto mohlo zaniknouti, neboť většinu esperantistů spojuje idea všelidského bratrství, posmívej se tomu kdo chce, jak chce. Tak je už silně a uvědomělé toto povědomí mravního závazku k příslušníkům cizích národů, že leckde nacionalistická policie už větrila a bude ještě větrít. Fašismus není ještě mrtev. Ale chtějmež tomu nebo ne, vždy bude dosti lidí, kterým bude imponovat možnost rychle a přesně se dorozumívati s neprivilegovanými příslušníky jiných národů. A to dorozumívati se o themech složitých. Zde se nejedná o simplistní poučení ani o simplistní snahy. V esperantu se už od nějaké doby nepiši verše, ale básní se v něm; píš se dobré verše i proti vůli fanatických propagandistů, kterým se zdá, že tím trpí snadnost jazyka. Věnujeme v tomto čísle více místa veršům, abychom sobě i těm, proti nimž tuto polemizujeme, tento fakt znovu ověřili. Jsou tu překlady klasických českých veršů, jsou tu dnes verše Čecha, který svou pouť na esperantský Parnasos právě začíná.

Jedná se však o více. Jde o to, aby mezinárodní pomocný jazyk byl rozšířen v daleko větším rozsahu než je dosud esperanto. Někteří stoupenci

V poslední době se jeví o esperantu nejen u nás, ale i v ostatních státech značný zájem. Je to pochopitelné, neboť nutnost dorozumívání jazyka, jediného pro celý svět, nebyla ještě nikdy pocítována tak silně jako dnes, v době mezinárodních soudů a kongresů, konferencí a zájezdů, neschopných jednání — bez tlumočnicků. I když to jsou tlumočníci vybraní a s dlouholetou praxí, přece jen dochází často k trapným, někdy i nebezpečným nedorozuměním, jak o tom čteme v denních listech. Četli jsme o choulostivém střetnutí sovětského zástupce s anglickým na mírové konferenci v Paříži, které bylo zaviněno nesprávným překladem. Nedostatky tlumočnického systému při sebedokonalejším technickém zařízení i nudnou zdoluhavostí takového jednání nám názorně ukázal proces s K. H. Frankem. Naším dorozumívacím jazykem se světem byla do osvobození němčina. Byla? A už není? Zeptejte se, jak korespondují naše exportní podniky s cizinou. I ty znárodně! A v kterém jazyku vy byste odpověděl Švédovi, Norovi, Dánovi, Holanďanovi, kdyby vás na dráze, v bance, na pražském veletrhu požádal o informaci? Vrátime se proto kajičně k němčině? Zavedeme ji opět do škol? Jme jediný národ v Evropě, který škrtl němčinu z vyučovacího programu. Potřebujeme náhradu. Veřejnost si to uvědomuje. A uvědomují si to také ostatní národy Evropy — i Angličané a Francouzi. Z důvodů mocenských a prestižních to může být jen jazyk, který nepatří nikomu a všem, tedy neutrální esperanto, které uskutečňuje demokratický princip rovnosti mezi národy a má nadto tu neocenitelnou vlastnost, že je snadné. tk.

Jiskra (Třebíč) 10. 11. 1946.



Regiona peranto Pytloun inas guidikurson!

Karolo Piĉ:

AŬTUNAJ ARBOJ

En parko staras du tilioj;
Folioj jam sur ili palas
Kaj falas teren po dekmiloj.
Sunbriloj tiujn arbojn kisas,
Aŭ viŝas ilin pluvaj gutoj.
Kaj flutoj ventaj molsonore
Kaj plore super ili ĝemas;
Sed tremas plu la flavaj arboj
Sub harpoj ventaj kiuj ludas;
Kaj nudas kiel nudigitaj
Enlitaj inoj postmatene;
Kaj svene per la branĉoj gestas,
Kaj restas mutaj senkomprene.

Karolo Piĉ:

RELOJ

Vi, reloj, estas kiel ŝtrumpteniloj.
Vi longas longen sub someraj briloj;
Papavoj apud viaj vojoj floras;
Matura gren' laŭlonge de vi oras;
De temp' al temp' vagonoj sur vi bruas;
De lok' al lok' riveroj sub vi fluas;
Jen varma pluvo akvon sur vin verŝas;
Jen papilioj super vi ekŝercas;
Kaj kiam la virino sur vi iras,
Sub ŝian jupon vi rigardojn tiras.

Josef Svatopluk Machar:

ROMANCO PRI KAVALIRA TRIOPO KAJ TIES BENKETO.

La dukkortego en Ferrara,
jen de kortegoj ĉiuj krono:
transmigris tien de Olimpo
Venuso, Mars' kaj Apolono.

La gloron de la duk' ankoraŭ
kvazaŭ juvelo pligrandigas
tri kavaliroj, kiujn vere
unika amikeco ligas.

Fidele ili kunestadas
al trifolio similante —
neniam du, neniam unu,
nur kune ĉiuj tri konstante.

Por si benketon ili lokis
proksime apud la palaco:
benketon, kie krom por ili
ne restis plu sufiĉa spaco.

Kutimis ili sidi tie
kaj ridi, ŝerci kaj babili,
kaj ne havante samspeculojn,
al trifoli' similis ili.

Eĉ mem la duk', eĉ sinjorinoj
sidiĝus ĉe ilia flanko,
sed vana estis la klopodo
pro absoluta spacomanko.

naŝi myŝlenky se domnĭvajĭ, že by se zavedenĭ pomocnĕho jazyka urych-
lilo, kdyby se v esperantu zavedly dalekosĕhlĕ reformy, nebo kdyby se
podle zkuŝenostĭ s umĕlymi jazyky sestrojil novy umĕly jazyk, zcela do-
konalĭ, jenž by pak byl pĭijat nĕjakym nařizenĭm instituce dosud neznĕ-
mĕho pŭvodu s dostateĉnou autoritou, aby takovou reformu mezinĕrodnĭch
stykŭ uskuteĉnila. Nemyslĭme, že je to theorie sprĕvnĕ. Mezinĕrodnĭ jazyk
nelze nařiditi, ani nelze esperantu nadekretovati reformy. Je to tak
nemožnĕ jako na pĭiklad, aby filologovĕ vyhovĕli pĕřĭnĭ dra Milana Ivanky
pronesenĕmu v Svob. novinĕch z 2. list. v souvislostĭ s Trĕvnickovym ĉlĕn-
kem, a zjednoduŝili gramatiku ruskĕ řeĉi a vyobcovali z nĭ nĕmeĉkĕ, ta-
tarskĕ a jinĕ neslovanskĕ slova. V tom je prĕvĕ velikost a pŭvab ruŝtiny,
ta jeĭ rozsĕhlost, ta podobnost s valĭcĭm se proudem veletoku, jenž sbĭrĕ,
strhuje a absorbuje vŝe, ĉeho se dotkne. A proto nenĭ tak snadno ovlĕ-
dati ji dokonale ani ĉechovi.

Ale ŭkol a poslĕnĭ esperanta je prĕvĕ v tom stĕti se pomocnou mezi-
nĕrodnĭ řeĉĭ, kterĕ vĕrazovymi moŝnostmi se vyrovnĕ jazykŭm nejroz-
vitĕjšĭm, ale snadnostĭ pĕkonĕ a mĕlo rozvitĕ jazyky nĕrodnĭ. Naŝe
pĕrice nese se za tĭmto ĉĕlem. A jsmĕ velmi zklamĕnĭ, vidouce u ĉeskych
filologŭ nezĕjem a pĕri tom informovanost jen diletantskou.

Vĭme ovŝem ze zkuŝenostĭ vlastnĭ, že dokonalĕ informovanost v inter-
lingvistice nenĭ plod, kterĕy uzraje za hodinu. Dr Stan. Kamarŭt.

32-a Universala kongreso de esperanto.

Bern, 26-a Julio — 2-a Augusto 1947.

Informoj pri la restado en Berno.

Pro la nuntempaj malfacilaĵoj estis la Loka Kongresa Komitato de-
vigita, nevolonte, fiksi la aranĝon de la restado kaj la nutrado kune por
la tuta tempo de la 26-a Julio vespere ĝis la 2-a Augusto posttagmezo.
La aranĝo konsistas do jene: ĉambro, matenmanĝo, tagmanĝo, vesper-
manĝo kaj trinkmono kaj ĉe la hoteloj ankaŭ transporto de la pakajoj.

A. Hotelĉambroj:

Estas nur tre malmultaj ĉambroj, kiuj estos ĉe nia dispono. Tiuj estos
dividitaj en 3 kategorioj:

Kategorio I Luksa klaso por 8 tagoj Sv. fr. 205.—

Kategorio II Komforta klaso por 8 tagoj Sv. fr. 155.—

Kategorio III Modesta klaso por 8 tagoj Sv. fr. 130.—

Ni petas, ke tiuj, kiuj deziras loĝi en hotelo, sendu al ni tiel baldaŭ kiel
eble la konvenan mendon kaj zorgu ankaŭ, ke la konforma monsumo es-
tos transpagita en svisaj frankoj al nia konto ĉe la Schweiz. Volksbank
en Bern.

Ni ripetas, ke estos al ni eble disponigi hotelĉambrojn nur al decidita
grado kaj nur al tiuj kiuj plej frutempe mendos kaj antaŭpagos.

B. Ĉambroj ĉe privatuloj:

Krom la hotelĉambroj ni disponos pri kelkaj cent ĉambroj ĉe privati-
uloj. Ankaŭ ĉi tie ni estas devigataj fari kolektivan prezon, kiu valoras
por 8 tagoj. En tiu prezo estas enkalkulita: ĉambro, maten-, tag-, kaj vesper-
manĝo. Multaj tre bonaj bernaj restoracioj estos je la dispono laŭ
deziro kaj elekto.

La prezo en tiu aranĝo estos sv. fr. 120.—

C. Amas-resteĵo:

Ĉe nia dispono estos plur-centoj da litoj en lernejoj kaj kazernoj. Ri-
late la nutrado troviĝas du solvoj:

Kategorio I. Resteĵo kiel skribata kun servado kaj nutrado. En bona
berna restoracio laŭ propra elekto (maten-, tag-, kaj vespermanĝo).

Tuta prezo sv. fr. 110.—

Kategorio II. La sama kiel supre rilate la resteĵo, sed pli modesta nu-
trado troviĝas en similaj restoracioj.

Tuta prezo sv. fr. 85.—

Ni devas atentigi, ke ne nur por la privataj ĉambroj, sed ankaŭ por la
amas-resteĵo la baldaŭna mendo estas tre necesa kaj la samtempa pago
de la monsumo al Živnostenská banka en Praha por konto de la 32-a Uni-

versala Kongreso de Esperanto 1947 en Berno per la Schweiz. Volksbank en Bern.

Ni povas garantiĝi nur pri tiu restado dezirata de la kongresano, kiu sekvas niajn instrukciojn. Ni petas vin, kiel eble plej frutempe decidi vin pri la aliĝo, ĉar la necesa deviz-permeso bezonas tempon.

Tendkampo.

Ĉe Bern troviĝas bela kaj bona tendkampo, nur 2 km de la Kongresejo, en Eichholz. Por eksterlanduloj ĝi estas tute senpaga. Eble troviĝos kelkaj tendoj por tiuj kiuj ne povos kunporti tendon. Luprezo 1 sv. fr. po nokto.

Pagmaniero

Laŭ la regulo de Internacia Esperanto-Ligo devas la kongres-kotizo esti pagita antaŭe.

Ĝis 31. XII. 46 31. III. 47 Poste

1. Kongres-kotizo	sfr. 25.—	sfr. 30.—	sfr. 35.—
2. Por la edzino	sfr. 12.—	sfr. 15.—	sfr. 20.—
3. Por gejunuloj ne pli ol 20-jaraj	sfr. 10.—	sfr. 12.—	sfr. 15.—

Pro la malfacilaĵoj de la deviso, estas necese, ke ankaŭ la kosto por loĝado, manĝaĵo kaj partopreno en la ekskursoj estu pagita antaŭe.

Ĉiu transpago estu pagata al Živnostenská banka en Praha por la konto de 32-a Universala Kongreso de Esperanto 1947 en Bern per la Schweiz. Volksbank en Bern. La banko donos necesajn konsilojn.

100 svisaj frankoj = 1162.80 Kĉs.

En la komenco de novembro aperos la unua numero de la kongresa gazeto »Svislando vokas vin«. Havigu ĝin al vi skribante al 32-a Universala Kongreso de Esperanto, Bundesgasse 20, en Bern; ĝi enhavos utilajn informojn por ĉiuj vojaĝantoj kaj cetere aperos regule ĝis la kongreso.

Jen Morto venis, unun prenis —
kaj la aliaj solidare
desegis pecon de l' benketo
kaj nun sidadis tie pare.

Kaj poste forkondukis Morto
la duan en la senlumecon —
la lasta kavalir' soliĝis
de l' benko reseginte pecon.

Sur la benket' sidante sola
sopire pensis li pri tio,
kiel sidalis ili kune
kaj estis kvazaŭ trifolio.

Sed fine ankaŭ lin la Morto
kondukis for, la senevita,
kaj la malgranda benko ligna
de tiam restis forlasita. —

Se vi do havas kompanion,
similu ankaŭ trifolion
kaj agu ĉiam laŭ instruo
de l' kavalira triumuo.

Se prenos Mort' amikon vian,
ne serĉu por kompens' alian;
de l' benko seĝu pecon — hola! —
kaj restu du... Kaj fine sola...

El la ĉefa Miloš Lukáš.

Novaj libroj.

Jarlibro de IEL 1946, Dua parto. 52 paĝoj. Aperis en oktobro. Daŭrigo de listoj de la Delegitoj, kiu dokumentas pluan pliampleksigon de ilia reto. El Ĉeĥoslovakio enestas pluaj 22 lokoj. En komitato estas enskribita nia reprezentanto. Josef Vondroušek el Brno, inter Aliĝintaj landaj asocioj estas enskribita ankaŭ nia Asocio. En la fino estas *Leĝa terminaro* de Dr A. Mildwurf, 8 paĝoj kun terminoj tre bezonaj. Multaj el ili estas vortoj tre uzataj el Plena vortaro, kelkaj estas vortoj tre novaj, kelkaj terminoj estas nove difinitaj aŭ klarigitaj. Ne aĉetebla, sole por IEL-anoj.

Ni legis.

Internacia kulturo, kultura revuo de balkanlandaj Esperanto-Asocioj, komencis en septembro 1946 sian duan jarkolekton. Ĝi estas tre belaspekta revuo, 16-paĝa, 31x23 cm, ekskluzive esperantlingva, kun artikoloj de komuna intereso precipe el politiko, ekonomio kaj kulturo. La gazeto estas politika. Lia tendenco

estas klara: kontraŭ faŝismo! Tial ni povas saluti ĝin kiel kumbatalantojn sur la sama fronto: por Esperanto kaj kontraŭ faŝismo. Ankaŭ poezio en la nova gazeto estas tendenca. Ni citu parton el versoj de Vasil Borovko »Homaro«. La versoj ne estas bonaj laŭ reguloj de ritmo nek laŭ kutima sentmaniero de leganto de versoj. Sed la konkretco de la redonataj spertoj ne restas sen efiko je nia koro:

»El maliberejo mucida
mi kuris for!« —
skribas juna hispano. —
Kun la popol'
kontraŭ Franco sangavida
mi tenas ŝtalan pafilon en la manoj!«

Jen estas funebra respond' el
Greklando:

»Ne plu vivas via amiko!
Faŝista bando
lin kaptis kaj murdis.
Viktim' li fariĝis de reĝa kliko.«

»Vi ĝojul Ĉar liberecon
vi havas finfine!
Ĉar vi venkis la faŝistojn!
Por ni ĉinoj
furiozas nova milito,
incitita de l' imperiistoj.«

»Korsalutojn el Usono!
Kiel vi fartas, amata amiko?
Ĉe ni estas denove
krizo malbona.
Ne sufiĉas la mono,
Ni estas ree en striko!«

La revuon redaktas Assen Grigorov en Sofia, Str. Graf Ignatief 2, Bulgario. Abono kostas Kĉs 110.— ĉe nia Administrejo en Praha XIX, Uralské nám. 9.

»Ĉinio hurlas« malpermesita. Nia bona samideano Jan Tuček sendas al ni leteron de sia ĉina korespondanto Joanff Ĉoŭ el Tientsin; en ĝi oni legas interalie: En nia lando la popolamaso vivas maltrankvile sub la minaco de interna milito, t. e. milito inter la nacipartio kaj komunista partio. La unua estas la popolamasoj, al kiu apartenas precipe kamparanoj kaj laboristoj. Eble vi scias, ke ĉirkaŭ 85% de la loĝantaro en Ĉinlando estas kamparanoj kaj la ceteraj laboristoj kaj inteligentularo. Tial la komunista partio estas la plej forta, sed ĝi estas atakata de la nacipartio kun la helpo de Usonaj armiloj. La ĉina popolo nun spertas la plej doloran vivon en sia tuta historio. La registaro

mortigas demokratojn, malpermesas la eldonadon de demokrataj periodaĵoj. »Ĉinio hurlas«, kompreneble, estas malpermesita. (Internacia kulturo, septembro 1946.)

Bellamy kaj Esperanto. La unuiĝo Bellamy plene konscia pri tio, ke realiĝo de Bellamy-ekonomio nur internacie estas ebla, tiris el tio la konsekvencojn, kaj starigis superan instancon »Internacia Asocio Bellamy«, kiu por sia agado uzas nur Esperanton. Adreso Jos. V. Wijn-gaarden, Toren-straat 26, Beverwijk (Nederlando). (SAT-Amikaro, oktobro.)

La vivo, Gazeto por ideologia konstruo kaj internacia edukado. Nova ciklostilita revueto komencis aperadi en oktobro, redaktita de E. van Veenendaal-Bouwens en Limmen (N. H.) Nederlando. Jarabono 2.50 guldenoj. Ni legis tie komencon de artikolo La geografia faktoro en la historio, raportanta pri faktoj ĝenerale konataj.

Korespondi kun ĉs. samideanoj deziras: S-o J. G. Schellart, Vlentenscheweg 340, UTRECHT, Nederlando. F-ino Els Hoenders, Pijnboom str. 101, s GRAVENHAGE, Nederlando. S-o A. Bennink, Renbaan-straat 32, ENSCHEDE, Nederlando. S-o J. A. Bédier de Praire, Cijpresstraat 120, DEN HAAG, Nederlando.

Ĉtete! Objednejte!

E. Lanti:

Děličký esperantismus.

Zasílá za 6 Kčs v pošt. známkách
Kulturo v Plzni, Hlouškova 17.

La prolet-esperantistoj povas profiti sian esperanto-scion nur tiam, se ili estas anoj de SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA-kultura kaj interhela organizo de laboristaj esperantistoj. La gekamaradoj, kiuj nun aliĝas al SAT, kaj volas ricevas SENNACIULON, pagas nur duonon de jarkotizo (30 Kčs). La mono estu sendata al SAT peranto, Josefo Patera, Plzeň - Dvořákova 24. Li akceptas ankaŭ mendojn de Plena Vortaro, kiu aperos en novembro.

Praktikan enkondukon de Esperanto en sciencojn celas oficejo starigita en Nederlando. Adreso: drs G. F. Makkink, Eehoornlaan 10, Bennekom. (Espero katolika, nov. 1946.)

Geskoltoj atentu!

En marto. 1946 estis fine starigita la esperanta fako ĉe J u n á k, asocio de ĉeĥoslovakaj geskoltoj. Estroj de tiu ĉi fako estis nomitaj fratuloj Fr. Buhr kaj St. Lešinger. Ambaŭ fratuloj longe propagandas Esperanton inter skoltoj kaj estas komitatanoj de Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko.

Nun ni petas ĉiujn alilandanojn, ke ili subtenu nian laboron.

Klopoĉu fondi esperantan fakon ĉe via nacia skolta asocio.

Anoncu, ke ĉeĥoslovakaj geskoltoj volas korespondadi kun geskoltoj de la tuta mondo pri skoltaj aferoj, kaj speciale kun tiuj, kiuj volos partopreni la venontan jam-boreon.

Korespondaĵon sendu al adreso:

J U N Á K, asocio de ĉeĥoslovakaj geskoltoj, Esperanto-fako, Praha II., Štěpánská 61. Ĉeĥoslovakujo.

REGIONAJ PERANTOJ

sendu listojn de viaj korespondaĵoj al ĝen. sekretario B. Paleček en Praha II, Podskalská 49, por ke ni:

1. sciu pri via agado,
2. povu repaĝi al vi viajn elspezojn!

Laborista junularo. En la kadro de Sveda Laborista Esperanto-Asocio estas fondita »Junulara Komitato«, kiu celas propagandi esperanton en politikaj, fakaj kaj kulturaj organizoj de laboristaj gejunuloj kaj infanoj. Por tiu laboro ni deziras kontakton kun esperantistoj en ĉiuj landoj, kiuj povas doni al ni informojn kaj materialojn. Ni deziras artikolojn pri junularaj movadoj por traduko kaj aperigo en la svedaj junulargazetoj kaj cetere ni petas ĉian materialon, kiu koncernas la junularorganizojn, la utilon de esperanto kaj la eblojn kontakti kun pluraj landoj per unu lingvol Ĉiun sendinton ni rekomencos per informoj pri la svedaj organizoj. Sendu tuj al: Sveda laborista Esperanto-Asocio, Junulara Komitato. Barnhusgatan 8. ö. g. n. b. STOCKHOLM, Svedio.

Espero Katolika. Abonpagon Kčs 60.— por jaro akceptas f-ino Ludmila Dandová en Praha XI, Jakoubkova 3, poŝtsparkasa konto 201.942. Ĝi estas monata revuo sur tre bona papero bele presita, malkara, regule aperanta.

Ĉeĥoj skribante al niaj Radio-stacioj uzu ĉiam sian gepatran lingvon! Tiel ĉiu referanto komprenos senpere vian informon.

Karolo Piĉ:

VERSISTO

Elektra vitra piro
sonoras kiel liro,
dum ampoeton kiu fordronas en deliro,
prirabas pri la spiro
insista kordeziro:
esprimi sin per kanto de sia muta liro.

Sed ĉiu lia verso
kontraŭas al ekzerco
kaj lian viran penon respondas nur per ŝerco.

Do li post miskonfuzo
de ĉiu sprita ruzo
nun preĝas korhumile al sia sankta Muzo.

Kaj eble ŝi sub brilo
de lia lampa piro
sonigos nun la kordojn de lia orfa liro;
kaj tiam li kun miro,
kaj eĉ per simpla diro,
esprimos sian mutan sentegon de l' Sapiro...

Jan Neruda:

ROMANCO PRI KAROLO LA KVARA.

Ĉe kverka tablo reĝ' Karol'
kun Bušek z Vilhartic nun lokojn prenis;
jam ofte ili kune trinkfestenis
kantante laŭ plezura vol'.
»Pokalojn orajnl — Verŝu plene!
la reĝ' ordonas al paĝi'.
»Nun, Bušek, ion spertos vi!
li diras ĝojmiene.

»Jen, Bušek, la unua vin',
kiun ĉe ni kulturi mi sukcesis;
ĝin antaŭ jar' ĉi-landa sun' karesis!«
Subite, gustuminte ĝin,
kraĉetas li. »Ho ve, ĝi estas
ne vin', sed buškurbiga feĉ'!
Ĝi nukon mian rompos eĉ!« —
kaj li kolere gestas.

»Eh! — el burgunda vinober',«
la reĝo ekscitite plu murmuris,
»ĉi tian vermutajon elkulturas
la adorata ĉeĥa ter'!
Pri persikarbo mi ne miros,
prunelojn se produktos ĝi;
plantante rozojn tie ĉi,
nur mokon mi akiros...

Kaj kia lando, tia gent'!
Jes, ĉiu ĉeĥo estas obstinulo:
li pagus eĉ predikon de sanktulo
per bato — aŭ per malatent'.
Jen kvazaŭ draŝ' de pajla fasko;
nur tion sperti, ke sen ĉes'
min persekutas malsukces' —
kiel ĉagrena, tasko!«

La reĝo tamen post moment'
retrinkis. Lia milda okulparo
kaŝeme turnas sin al la najbaro —
sed tiu restas en silent';
nur — por ne teni sin senmove —
li trempas lipojn en la vin',
al la palato premas ĝin,
sur lang' ĝin rulas prove.

La reĝ' ripetas: »Jen ĉagren'...« —
sed li rapide novan gluton faras
kaj sian pluan plendon tiel baras;
sed sereniĝas la mien'.
»Pokal' malplenas! Ha, terure!
Ĉu pro soifo mortu mi?
Ne estu blinda do, paĝi',
kaj verŝu bonmezure!

Nu, Bušek, ne malĝoju plu!
Jen kion diras via reĝ' prudenta:
nun mia lango, certe subtilsenta,
ĉi vinon taksas jam kun ĝu'.
La juĝo devas esti justa!
Ĝi estas vin' de stranga spec':
maldolĉon sekvas agrablec' —
ni trovas ĝin bongusta.«

»»Simile, reĝo, nia gent':
malmilda ŝajnas ĝi kaj iom stranga,
sed ĝin ornamas ĉarmo siaranga,««
sin liberigis de l' silent'
sinjoro Bušek tre volonte.
»»Ĉi genton fidu; baldaŭ ĝin
alpremos vi al via sin',
ne plu ĝin forpuŝonte!««

El la ĉeĥa Miloš Lukáš.

Jaroslav Seifert:

BARIKADO EL FLORANTAJ KAŜTAN-ARBOJ

(El la poemaro »Kasko da argilo«, 1945.)

Ne tiel estis aliloke. Sed ĉe ni sur bulvaroj
elkreskis barikadoj el floraj kaŝtan-arboj.

Faladis arbo post arbo. Ho lustroj kandel-plenaj!
Kaj viroj en la flamojn kuŝiĝis silentemaj.

Ekestis hela tago kaj tondris baterioj
kaj homoj viŝis al si la ŝviton de l' tempioj.

Fratino venis al ili kaj portis en la manoj
kruĉon da akvo, cigaredojn, panojn.

En la varmeg' ja devis la arbfolioj velki.
Rapidis la fratino por flegi kaj por helpi.

Hezite staris ŝi super la bandaĝaro:
Tro multe da labor' por unu brakoparo.

Unu, du, kvar viroj vunditaj en atakoj...
Ho arboj! Viajn branĉojn ŝanĝu je homaj brakoj!

Tri viroj agoniis; kaj dum la hom-stertoroj
mortis ankaŭ la arboj, mortis la kaŝtan-floroj.

Oni portis la virojn for el la batal-bru'...
Sed tiuj kaŝtan-arboj kuŝas tie plu.

(Majo 1945) El la ĉeĥa Dr T. Pumpr.

KRONIKO ENLANDA.

Al distrikta konferenco de Komunista partio en Plzeň la 17-an de februaro 1946 estis prezentita sekva propono: En la mondo estas pli ol du mil naciaj lingvoj. Estas devo de la plej granda partio politika en la ŝtato ebligi al ĉiuj vizitantoj de Praha kaj de Ĉeĥoslovakio entute interkompreniĝi sen interpretistoj. Al la lingvoj rusa kaj angla instruataj per disaŭdigado apartenas ankaŭ Esperanto. Esperanto estas tiu helpa lingvo, kiun jam rekomendadis J. A. Comenius kaj kiu ebligas jam hodiaŭ al anoj ankaŭ de la malgrandaj nacioj bone interkompreniĝadi, konservi memkonscion kaj kunlabori en konstruado de pli bona mondo. Esperanto kiel neŭtrala lingvo, kiu nenium preferas, ebligas ankaŭ al la laboristaro partopreni en konstruado de reciproka solidareco inter ĉiuj nacioj de la mondo. Estas devo de la komunista partio, ke ĝi apogu siamaniere problemon de unueca lingvo kaj klopodu por ĝia instruado perradia. (J. Pelcman).

*

Alilandaj Esperantistoj en la Radio-Praha. En la Esperantoelsendoj de Praha parolis dum la lasta tempo: s-anoj A. Glud (Kopenhago), studento M. Pisarski (Sofia), L. G. C. de Jong, ĝen. sekr. de IKUE, (Roelofarendsveen) kaj s-rino M. Daems (Bruselo); ŝi estis intervjuata Esperante kaj france pri la Foiro de Praha.

*

Ĉeĥoslovaka ministerio de informoj (ĝia departemento VI en Praha III, Tržiště 9) aperigas ciklostilitan bultenon semajnan Kulturní informace (Kulturaj infor-

moj) sendatajn al redakcioj por uzo en la gazetoj kaj jurnalaj. En siaj numeroj 33 kaj 34 (12. X. kaj 19. X.) ĝi enhavas unupaĝan rubrikon Esperantský svět (Esperanto-mondo) kun tre bonaj informoj pri nia movado. Krome enestas aludoj pri Esperanto en kelkaj artikoloj de aliaj rubrikoj. Enmeto de tiaj sciigoj en tiun ĉi bulleton signifas tre oficialan rekonon de nia movado kaj ni dankas la ministerion pro ĝia larĝvida kompreno de la aferoj. Nia Informministerio donas volonte publikecon ankaŭ al sciigoj neoficialaj. Niaj legantoj fremdlandaj povos tre utili al bona afero, se ili sendos senpere sciigojn gravajn kaj interesajn, memkompreneble verajn, pri kulturaj okazintaĵoj en siaj landoj. Skribu pri ĉio konkrete kaj kun nemultaj vortoj, raportu pri faktoj, forigu lirikaĵojn, vi faros tre utilan laboron por reciproka konatiĝo inter la popoloj diversaj!

★

Kunveno de nordbohemiaj esperantistoj estis en Liberec la 21 kaj 22-an de septembro okaze de la Ekspozicio »Ni konstruas la liberigitajn regionojn«. La kunveno estis aranĝita de nia loka grupo. Venis samideanoj el Liberec, Praha, Brno, Uherské Hradiště, Hradec Králové, Benátky n. J., Tanvald, Mnichovo Hradiště. El centra komitato ĉeestis prez. A. Malík. Summe 60 p. Reprezentantojn sendis urbeestraro distrikta estraro de sindikatoj. Sabaton je la 17-a horo estis laborkunsido en hotelo Imperial, kiun malfermis la grupa prez. direktoro Knížek per preleĝo pri historio de la loka grupo. Je la 20-a amuzvespero en la sama hotelo. Dimanĉon je la 9-a horo estis komuna vizito de la ekspozicio, kiu trovis ĉe ĉiuj konsenton kaj admiron de rezultoj akiritaj dum tempo nelonga post la milita kaj naziista detruo. Posttagemeze estis ekskurso al Ještěd. La vizitintoj estis kontentaj kun la akcepto kaj dankis la aranĝitojn.

★

Kion skribas Germano al Radio-Praha. »Aŭskultinte jam ofte viajn sendojn en Esperanto, mi ne volas preterlasi komuniki al vi, ke mi ilin tre klare, bone kaj kompreneble ricevas. Inter viaj lastaj sendoj estis speciale interesaj la raporto pri flugvojaĝo de Amsterdam al Praha (rim.: intervjuo kun L. C. Long) kaj la raporto pri terposedaj reformoj en via lando. Se mi ankaŭ estas Germano, mi pensas, ke vin tamen interesas, kiel mi povas kapti vian stacion kaj speciale la Esperanto-prelegojn. Mi aŭdas la sendojn precipe bone sur mezlongaj ondoj. Estante jam Esperantisto de 27 jaroj, vi povas kredi al mi, ke ni Esperantistoj estis ĉiam kontraŭfaŝistoj. Speciale mi gratulas al via Esperanto-parolanto pro lia klara kaj facile komprenebla elparolo kaj prononco. Do daŭrigu viajn Esperantelsendojn, ni munĉenanoj volonte aŭskultos. Samideane J. Bernhard, München.«

★

Lecionoj de Esperanto-lektoro Paŭlo Rosa en Komerca altlernejo en Bratislava komencis en oktobro.

★

Inspektoro por Esperanto-instruado en fakaj lernejoj slovakaj estis de slovak komisiito por instruado nomita s-ro Vlado Jukl, profesoro de Komerca Akademio en Bratislava. Akcentante gravecon de tiu ĉi aranĝo de la komisiito, kiu per ĝi kompletigas sian

decidon pri permeso instrui nedevige Esperanton en slovakaj komercaj lernejoj, ni dankas al li pro tiu ĉi larĝvida decido. Kaj ni uzas tiun okazon por saluti tie ĉi malnovan esperantiston samideanon Jukl, laborinton por nia afero en modesteco modela dum jardekoj. Ni gratulas al li laŭ lia maniero: per vortoj malmultaj sed despli sinceraj.

★

L. C. G. Long, sekretario de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista el Nederlando, vizitis kun sia edzino nian landon de 17—31-a de aŭgusto kaj havis ĉe la centraj kancelarioj de la Katolika Agado en Praha, Hradec Králové kaj Bratislava prelegojn pri la organizo kaj praktika laboro de la Katolika Agado en Nederlando. En ĉiuj tiuj urboj okazis publikaj prelegoj esperantlingvaj tradukataj ĉefen pri la Haveno Rotterdam, sekigo de la Suda Maro (Zuiderzee), detruigo kaj subakvigo de tiu laboro fare de la germanoj. Ili havis ĉie grandan viziton kaj tre bonan sukceson. Landon la 22-an de aŭgusto Radio-Praha dissendadis intervjuon kun li. Dum sia restado en Praha, ili plurfoje renkontis sinjoron doktoron A. Eltschkner, helpiskopon en Praha, kaj vidis, kiom serioze li ĉiam sekvas nian movadon. En »Espero katolika« el oktobro ni legas dankon de s-ro Long al la ĉeĥoslovakaj gastigantoj. Ni uzas tiun ĉi okazon por danki al li pro lia sindediĉo al idealo kaj pro fervoro, kun kiu li plenumadis siajn klerigajn taskojn.

★

Grandformata sveda jurnalo »Västgöta-Demokraten«, Boras, publikigis sub la titolo: »Eltranĉaĵo el V. D. ekspoziciata en domo de la radio Praha L.«, 94-linia artikolon de la asocia sekretario J. Mařík. La artikolo mencias unue internacian eĥon de la informo de »V. D.« pri la ĉeĥa ŝuisto s-ano Buben kaj represas poste — por Esperantistoj tre favoran kaj signifoplenan — artikolon de »Právo lidu« el la 6. I. 46, kiu akcentas praktikan valoron por ĈSR de la ĉsl. Esperanto-disaŭdigoj, citas speciale la aferon de germano Jaksch, kaj dediĉas poste kelkajn vortojn al Esperantista solidareco sveda-ĉeĥoslovaka, kiu estas ne nur ideala, sed ankaŭ praktika (sendaĵoj de vestaĵoj ktp.). En la fino de l' artikolo estas informo pri la rondvojaĝo de s-ano J. Vítek en Svedlando.

★

»Dana studento inter Esperantistoj de Ĉeĥoslovakio« estas titolo de granda artikolo en la jurnalo »Social-Demokraten« el la 8-a de sept. 1946, Kopenhago. Aŭtoro de l' artikolo, alridanta nin de sur la fotobildo, estas nia bona konato, dana studento Arne Glud el Kopenhago. Glud priskribas, kiamaniere estis plifaciligita, helpe de Esperanto, lia vojaĝo en ĈSR. Du apartajn ĉapitrojn li dediĉas al funkcio de Esperanto en la ĉsl. radio kaj al la kursoj en Doksy. En la unua li parolas pri sia intervjuo en la E-disaŭdigo de Praha kaj informas ankaŭ pri la signifa funkcio de l' ĉsl. radio dum la maja revolucio. En la dua ĉapitro li priskribas la Esperantistan medion en Doksy ĉe Mácha-Lago, la kursojn, Bezděz, E-teatraĵon, belajn popolkantojn, filmojn de Slanina pri la revolucio de Praha kaj fina liberigo helpe de Rusoj, mencias E-domon kaj straton en Doksy, kaj finas per apoteozo pri internacia frateco

de Esperantistoj, homoj plej idealismaj kaj oferemaj. — La artikolo havas gravan signifon propagandan, kaj por Ĉeĥoslovakio kaj por Esperanto. — Ĉe tiu okazo ni informas, ke ankaŭ ĉeĥa gazeto, »Kruh« aperigis artikolon de A. Glud, kaj pri lia vizito en ĈSR raportis »Práce« kaj »Právo lidu«.

★

Bulteno de Slovaka Esperanta Societo — Slovenké Esperantské Sdruženie estas »Informácie SES Informoj«, bele ciklostilita kajero; unua aperis kiel numero 1—3 por monatoj IV—VI, 24 paĝoj. Ni reprezentas nomaron de ĉefaj funkciuloj elektitaj en la fonda kunveno 5. V. 1946 Prezidanto Pav. Rosa, Bratislava, Štefánikova 39, vicprez.: J. V. Dolinský en Turč. Sv. Martin, Al. Váňa, Žilina, Pivovarská 3, Vlado Jukl, Bratislava, ul. 4. apríla 1. Sekretario Frant. Ďuriač, Bratislava, Jesenského 78, Koliba. La numero enhavas bonan slovakon tradukon de la E-himno, de F. Ď.

★

Gazetara servo aperigis en oktobro pluajn du paĝojn kun dekkvar prespretaj artikoletoj, kiujn sufiĉas simple kopii kaj sendi al redakcio de iu ĵurnalo. Ĉiu el niaj kunlaborantoj en la Gazetara servo, ricevinte ĝin, nepre oferi iom da tempo por tiu ĉi efika laboro propaganda. Plua nia peto estas: se vi vidas en iu gazeto iun ajn artikoleon aŭ sciigon, eĉ la plej mallongan, nepre sendu ĝin al ni. Ni kolektas ĉiujn tiajn eltranĉaĵojn, ankaŭ tiujn kontraŭ esperanto, ĉar ĝi prezentas materialon tre valoran por nia propaganda kaj redakta laboro. Ĉiujn tiujn eltranĉaĵojn sendu ekskluzive al nia Asocia sekretario Jar. Mařík en Praha II, Krakovská 20/I.

★

Labor-lernejo de Centra Estraro de Sindikatoj (ŬRO) en Praha II, Jerusalemská 5, en siaj prospektoj pri kursoj havas en listo de instruataj lingvoj ankaŭ Esperanton. La listo de lingvoj estas: ĉeĥa, rusa, angla, franca, serboĥorvata, sveda, itala, hispana, Esperanto. La prospektoj estas disvastigataj tre grandnombre.

★

Ciklo de ĉefaj prelegoj de ĉefaj esperantistoj, en kiuj estis ĉiam tuŝataj esperantistaj spertoj, estis organizata en Hradec Králové de 19. IX. ĝis 17. X., sume 5 preleĝoj, ĉiun jaŭdon vespere en muzeo-halo. Prelegis: Faka instruisto *Josef Vitek* reveninta antaŭ nelonge el sia vojaĝo tra Svedujo pri »Svedujo per miaj okuloj« kaj »Laplando kaj Narvik«. Lekto *Dr Aug. Pitlik*, konata vojaĝanto esperantista pri: »Rememoroj pri vojaĝoj tra Eŭropo« kaj »Rememoroj pri vojaĝo tra Usono«. Oficisto en Informministerio *Dolfa Bartošik*, konata Csehmetoda instruisto, ano de eksterlanda ĉeĥoslovaka armeo kaj estro de ĉs ŝtata lernejo en Anglio pri »Ĉeĥoslovakaj lernejoj dum la lasta milito«. La ciklon aranĝis kune Kulturfako de Direkcio de ŝtataj fervojoj, Distrikta konsilantaro kleriga, Esperantista klubo en Hradec Králové. Ili ĉiuj akceptu de ni gratulon pro la tre bona ideo kaj dankon pro la bone farita laboro. Nia grupo en Hradec Králové akceptu dankon aparte sinceran: ĝi estis entreprenado propagande tre altvarola, ĉar ĝi kunigis propagandon kun klerigo. Suma vizito 2.500 personoj.

Radio-Praha (mallongonda dissendado) invitas de post 25-a de septembro al fondo de *Aktiva Labor-komitato de prezidantoj* de naciaj asocioj esperantistaj. Praha estu ĝia sidejo, ĉar ĝi unusola en la mondo ĝis nun disaŭdigas esperantlingve ĉiutage, tial ĝi povas fariĝi centro de la movado.

★

Ĉefo iam M. Novosad nun C. Nyanasatta, abato en budhista monaĥejo en Ceylon (Kolatonna Hermitage), kiun ni salutis per artikoleto sur paĝo 20, aperigis en anglalingva budhisma revuo *The Bosat* (n-ro 4 el IX jarkolekto) sur paĝo 93 artikolon »El Praha al Colombo«, en kiu li priskribas tre impresive, kiel li jam kiel infano dediĉadis sin al kulto de izoleca meditado sentante sin inter la samgantoj kaj samfamilianoj kiel malbela anasido. Tiun senton, ke li ne apartenas inter la homoj de Eŭropo, li posedis daŭre en diversaj partoj de tiu kontinento. Lia edzino, kun kiu li konatiĝis en Hamburg kaj kiu sin sentis tiam same izola, post maledziĝo rekomendis al li studadon de budhismaj doktrinoj, en kiuj li trovis medion respondan al sia mensa aparteco, kaj li decidiĝis enprofundi sin en tiun religion kaj en ĝian studadon. Esperanto estis por li plej utila el ĉiuj dek lingvoj, kiujn li studis. Nun li laboras kiel budhisma misiisto inter la popolo Ceylona. En letero al s-ro J. Řebíček en Olomouc li promesas, ke li uzos Esperanton por propagando de ideoj de la popolo Ceylona kaj por disvastigado de ideoj budhismaj. Ni salutas lin sincere.

★

Scienca Revuo estas preparata. Akademia Esperanto-Klubo en Praha klopodas organizi nun internacian reton de aktivaj kunlaborantoj por estonta Revuo. S-ano Hanuš skribis en aŭgustan numeron de Esperanto Internacia artikolon pri la neceso kaj aktualeco starigi denove ian sciencon revuon, kaj nun li ekrlatis kun kelkaj eksterlandaj s-anoj, precipe el Anglio, Nederlando kaj Norvegio, kiuj respondis al lia alvoko. La skribintoj parolas ĉiuj pri revuo vere scienca kaj objektiva, kie oni trovas resumojn de gravaj artikoloj el monda scienca gazetaro, originalajn artikolojn aŭ tradukitajn, pri revuo, kiu estus vera kaj efika ligilo de scienculoj kaj kleruloj helpanta ilin en ilia laboro. Se ni sukcesos organizi la kunlaborantan reton, la apero de Scienca Revuo ne okazos en tro malproksima tempo. Ni klopodos kompreneble, ke la antaŭmilitaj diversaj revuoj, precipe Bulteno de ISAE kaj Scienca Gazeto de American Esperanto-Institute, reviviĝu en unu Scienca Revuo havanta altan nivelon kaj pro tio ankaŭ signifon por ĉiu scienculo. Kiu el niaj s-anoj interesas pri la Revuo kaj volas aktive kunlabori, t. e. verki resumojn, traduki ilin aŭ alie helpi, propagandi ktp., tiu skribu al s-ano Jaroslav Hanuš, Kladno 1997. Ni bezonos kunlaborantojn precipe en jenaj fakoj: matematiko kaj logiko, fiziko, kemio, biologio, psikologio, sociologio, filozofio. Samtempe ni informas la interesatojn, ke AEK malfermis siajn diskutajn vesperojn la 7-an de oktobro denove en Filozofia fakultato je la 19,30 horo. Por aŭtuno ni preparis la temojn: Demokratio, Filozofio rigardas la virinan problemon, Problemo de internacia lingvo, Noetikaj principoj, Scienculo kiel politikisto, Tasko de filozofio, Aristotelo. Ĉiujn interesatojn ni ĝoje bonvenigos.

Anoncojn pagitajn pri E. aperigas en Svobodné nov. (eldono por Moravio) E. Klubo en Brno. La anoncoj estas 136x40 mm, la teksto kaj la tipografia aranĝo estas unuaklasaj. La unuaj aperis la 16-an kaj la 19-an de novembro kaj daŭrigado estas planata. La samideana klubo akceptu la gratulon pro la bonega ideo kaj eminenta efektiviĝo.

*

Konferenco pri divido de agadsferoj inter Slovaka Esperantista Societo kaj nia Asocio estis la 28-an de oktobro en Brno. Por SES ĉeestis P. Rosa kaj Vl. Jukl el Bratislava, por EAĈSR A. Malík, el Praha J. Vondroušek el Brno, T. Kilán el Třebíč, J. Geryk el Brno, J. Friedrich el Brno. La detalaj tre amikoj diskutoj aprobis la ĝisnunan staton, laŭ kiu en Slovakujo laboras sendepende SES, en ĉefaj landoj sendepende nia Asocio, kiu tion vidigos ankaŭ en sia titolo. Titolo de Esperanto-Asocio en ĈSR estos uzata por organizo unuiganta la ĉefan kaj la slovakon asociojn por taskoj tutŝtataj kaj reprezentaj antaŭ la fremdlando. La rezultoj de traktadoj estos prezentitaj al decidantaj instancoj de la ambaŭ societoj.

*

Tutmonda Interŝanĝa Adresaro, eldonata de Fr. Buhr en Praha Břevnov 514, aperigis en oktobro sian 4-an numeron. La 3-a n-ro aperis antaŭ 8 jaroj. Tiu ĉi estas 4 paĝoj, 16x10 cm, kun 52 adresoj. Enpresado de adreso kostas 10 Kčs.

*

Kun Prepara Komitato de Sokol-kongreso 1948 ni kunlaboras en propaganda fako. La 14-an de oktobro legis s-o Rud. Hromada en Radio sian prelegon Kio estas Sokol?

*

Loka komitato de la Universala kongreso en Bern invitis samideanon Jan Geryk, eminentan violoniston, koncertmajstron en Radio-Brno, por violonkoncerto kaj disponigis al li por tio unu kaj duonhoron. Ni gratulas al nia fervora kunlaboranto pro tiu ĉi honorigo.

ESPERANTISTA VIVO.

Al samideano *Josef Friedrich*, prezidinto de nia Asocio dum la plej malfacila periodo, kiam teroro germana tiranis, kies kvindeknaŭnaskiĝdaton ni tiam jam ne povis enskribi, naskiĝis filino *Jana* la 4-an de oktobro 1946. Li kaj la patrino akceptu sincerajn gratulojn kaj la juna *Jana* fariĝu kontenta kaj feliĉa mondĉivitanino.

Al lia edziniĝinta filino sinjorino *Eva Turková*, nia membrino en Nový Jičín, naskiĝis la 2-an de novembro filo. Ni salutas la nepon de nia prezidinto same gaje gratulante kaj glorigante la tutan familion.

RADIO.

Auskultu kaj konfirmu ankaŭ fremdlandajn radiostaciojn disaŭdigantajn en Esperanto:

Bern ondolongo 47,28 m, dimanĉon 18,10—18,20 horoj,
Sofia ondolongo 352 m, merkredon 16,00—16,15 horoj,
Warszawa ondolongo 49,06 m, lundon 21,10—21,25 horoj.

NIAJ AKCEPTEJOJ:

Kie kaj kiam la samideanoj estas atingeblaj aŭ viziteblaj:

(ps = persone, tlf = per telefono):

Bojkovice.

S-ro Jan Tichoň, Bojkovice 247.

Brno.

S-ro J. Vondroušek, str. Botanická 31; ps. post la 16a; tlf. 11288.

S-ro Jan Geryk, str. Titova 8; ps. kiam ajn.

S-ro Tomáš Borkovec, tlf. 11288.

S-ino Fr. Vlčková, tlf. 19890.

S-ro Jiří Kořínek, tlf. 18199.

České Budějovice.

S-ro Ludvík Bezděka, ps. en laborejo, hotelo Slunce, labortempe.

S-ro František Vacek, ps. en strato Riegrova 680; tlf. 310, labortempe.

S-ro Karlo Hofhansel, str. Šumavská 250, ps. 17-19.

Doksy.

S-ro Václav Špár, laborejo: Sparkaso, ps. 7—15; tlf. Doksy 141 inter la 7—15a; hejmo: str. Stalinova 453, inter la 15—20a.

S-ro Václav Železný, laborejo: laktejo, ps. kaj tlf. Doksy 165, inter la 7—14a.

Hradec Králové.

S-ro Jaroslav Dolanský, ps. placo Masarykovo, presejo Oma.

S-ro Jiří Otčenášek, ps. str. Mánesova 910; tlf. 295.

S-ro František Tuch, ps. poŝtofiĉejo n-ro 2.

S-ro František Pytloun, ps. en domo n-ro 1010 kontraŭ la stacidomo; tlf. 292.

S-ro Josef Vítek, ps. kajo Smetanovo 952.

S-ro Prof. Miloš Lukáš, tlf. 299.

(Daŭrigo)

ĈU VI SATUS RICEVI BELAN ESPERANTAN LIBRON?

Bonvolu do partopreni nian konkurson!

Via tasko: *Skribu al nia radiostacio:*

1. Kion vi opinias pri Ĉeĥoslovakio?
2. Kio vin interesas, el nova vivo en Ĉeĥoslovaka respubliko?

Interesajn leterojn ni publikigos en ĉefa gazetaro. Ĉiu samideano, kies letero estos publikigita, ricevos ekzempleron de la gazeto kun sia artikolo kaj Esperantan libron. Sed ni petas, skribu tute sincere! La respondoj ne devas esti longaj. Sufiĉas kelkaj koncizaj, sinceraj frazoj. Ni ne dubas, ke vi afable diros pri tiu ĉi nia konkurso al viaj amikoj, eĉ al neesperantistoj, ke ni ricevu multe da respondoj kaj pruvu tiamaniere praktikan uzeblecon de Esperanto.

Ni jam antaŭe al vi dankas kaj esperas baldaŭ ricevi vian ŝatatan leteron aŭ poŝtkarton.

Sciigojn pri aŭdebleco de nia radiostacio kaj respondojn al nia konkurso bonvolu sendi al la adreso:

RADIOSTACIO OSTRAVA,

Ĉeĥoslovakio.

Vychází měsíčně (10krát do roka). Majitel, vydavatel, a nakladatel Svaz esperantistů ČSR v Praze 47. Redaktor Dr. Staa. Kamarýt. Ročně 70 Kčs s členstvím. Bez členství 60 Kčs. Ti skem Jar. Strojila v Přerově. Účast na poštovní novinové službě povolena ředitelstvím pošt v Brně čís. jedn. IA-4-2370-0/37132 15. 3. 46. Dohlédací poštov. úřad Přerov 2.